Protokolo de estrara interkonsiliĝo de

Norvega Esperantista Ligo

lundon la 27-an de aŭgusto 2018 per Skype

Partoprenantoj:

Mario Machlik en Tromsø
Ulf Lunde en Os
Anne Karin Bondhus en Bryne
Amelie Matt en Tromsø
Lars Sandbakk en Sandnes
Jardar E. Abrahamsen en Trondheim
Heming Welde Thorbjørnsen en Haugesund

Post 45 minutoj da teĥnika ĥaoso ni je 20.45 h finfine sukcesis komenci la interkonsiliĝon, sed tiam sen Heming, kies Skype dume paneis.

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo

La protokolo de la 24-a de majo estis aprobita.

2. Ekonomio

Skagen Høyrente 133 321 kr (132 857 kr).
Skagen Vekst 63 766 kr (62 713 kr).

La estraro ricevis de Leif Arne Storset inviton starigi Vipps Bedrift-konton.
Ulf Lunde kontaktu Leif Arne (kaj eble ankaŭ Douglas en Oslo) por esplori ĉu ni eble povos uzi la senkostan servon Vipps anstataŭ la multekosta servo Vipps Bedrift. Eble NEL rajtos uzi la saman Vipps-konton kiel la E-klubo de Oslo.

Lars Sandbakk disponas en sia retbanko la bankkonton de la ne plu funkcianta (sed tamen ne malfondita) E-klubo de Stavanger. Tie troviĝas ĉirkaŭ 6000 kr. Li volas transdoni la monon al NEL. La estraro petas al la kluboj de Bryne kaj Stavanger unue diskuti inter si, kion ili volas fari pri tiu sumo.

3. Jarraporto, jarkalkulo 2017

La Jarraporto kaj Jarkalkulo ankoraŭ ne pretas.

4. Informado en Facebook

NJE jam uzas Facebook aktive. NEL ĝis nun ne faris grandajn klopodojn vivigi sian aktivadon tie.

5. GDPR

NEL atentu pri la nova leĝo pri sekurigo de personaj datumoj.

Ni ŝparas nur minimumon da personaj informoj pri niaj membroj.
Tiujn informojn ni povas montri al la mebro se li demandas.
Ni volonte pliĝustigas la ŝparitajn informojn se la membro havas iujn korektojn.
Ni ne uzas tiujn informojn por ion ajn krom membrostatistiko kaj dissendado de membrogazetoj kaj fakturoj.

6. Planoj por la aŭtuno

Lars Sandbakk kontaktis Hamsunsenteret en Hamarøy kun informoj pri la tradukitaj libroj de Knut Hamsun en Esperanto, proponante, ke ili ofertu informojn pri Hamsun ankaŭ en Esperanto. Ili ŝajnis entuziasmiĝi pri la ideo.

Eble ni kontaktu aliajn muzeojn/centrojn pri famuloj, kun la oferto traduki informojn al Esperanto por ili?

7. Datoj por la venontaj estraraj interkonsiliĝoj

La venonta okazu je la 24a de septembro 2018 je 20.00 h.

8. Eventualaĵoj

Douglas Draper sukcesis starigi kontakton kun Duolingo (kun 1,7 milionoj da lernantoj) kaj volas inviti ties anoj al eventoj. Por i.a. tio estas oportune havi Vipps-konton por povi ricevi pagojn, kaj tial la Oslo-klubo jam havigis al si Vipps-konton.

Ulf proponas provi interkonsiliĝi per Zoom anstataŭ Skype venontfoje.
Ulf sendos informojn al Mario pri tio, kiel starigi kunvenon.

La interkonsiliĝo daŭris de 20.00 h (aŭ 20.45 h) ĝis 21.50 h.
Protokolis Ulf Lunde.